



LA FERA LUPO

Redakcia retadreso: ds@esperanto.lt; chtaesok@hanmail.net
<http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=jk>

ĈIUTAGA INFORMILO DE TUTMONDA KONGRESO DE ESPERANTISTOJ-JURNALISTOJ

N-RO 3 | 2008 05 29, ĵaŭdo

AKCEPTO DE LA ĈEFMINISTRO

Hieraŭ, la 28an de majo vespere la ĉefministro de Litovia Respubliko, Gediminas Kirkilas regalis ĉiujn kongresanojn per vespermanĝo. Li ne povis ĉeesti pro ŝtata laboro. Li estas la Alta Protektanto de nia kongreso.

Li aprezis, ke nia kongreso estas unika, ĉar ni povas interkomunikiĝi sen tradukistoj. Tute prave! Li menciis fieron de Litovio pro tio, ke sur ĝia tero fontas Esperanto-fluo: antaŭ pli ol 120 jaroj Zamenhof finverkis Esperanton, loĝante en la pitoreska sudlitora urbeto Veisiejai. La ĉefministro opinias, ke por internacia komunikado necesas la lingvo, kiu estu ne nur facile lernebla, sed ankaŭ neŭtrala.

La ĉefministra akcepto finiĝis en tre amika kaj agrabla etoso.



ABUNDO DA PRELEGOJ



Hieraŭ, la 28an de majo okazis matene kunveno pri la kongresa ĉeftemo kaj tiu de TEĴA. Audrys Antanaitis el Litovio elektigis nova prezidanto de TEĴA. Novaj estraranoj estas Aleksander Korĵenkov, Kalle Kniivilä, Vytautas Šilas, Mariana Evlogieva kaj Dieter Rooke. Poste okazis pli ol 20 prelegoj en tri apartaj salonoj.

FOTORAPORTO



La Malnova Urbodomo bonege servis nin dum du plenaj kongrestagoj.



Aroj da prelegoj rapidigas homojn malsupren por kafaŭzo.



Kvankam malvasta, la akcepteja salono de la hotelo grave rolas por konatiĝo kaj amikiĝo.



Rusa kolego Rojdestvenskij bone utiligas siajn lokajn gazetojn por Esperanto-informado.

Gratulo el la Eŭropa Parlamento



Estimataj partoprenantoj de la Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Ĵurnalistoj.

Mi gratulas Litovan Esperanto-Asocion pro la mirinda ideo aranĝi la kongreson. Kiel mi vidis, la programo estas pli riĉa ol mi povis antaŭe imagi. Mi kredas, ke la kongreso estos grava kaj fruktodona aranĝo en la historio de nia movado.

Por ĉiuj partoprenantoj mi deziras interesan tempon en la bela ĉefurbo de Litovio.

Malgorzata Handzlik
retoŝto: mhandzlik@europarl.eu.int
<http://www.malgorzatahandzlik.com>

La tonon donis Tonkin

La universitata profesoro pri humanistiko kaj la angla lingvo Humprey Tonkin faris la enkondukan prelegon pri la ĉeftemo de la ĵurnalista kongreso. Temis pri Internacia interkultura komunikado, la ligo inter ĵurnalismo kaj Esperanto. Komence li memorigis, ke ni partoprenas laboran kongreson kaj ĝin kronu niaj lobordirektaj konkludoj.

La preleganto proponis ne miri pri tio, ke la unua tutmonda kongreso de ĵurnalistoj-esperantistoj okazas ĝuste en Litovio. Ja Litovio estas lando forte ligita kun apero de Esperanto. Krome, nun estas la jaro de lingvoj kaj Litovio estas tre interesigita pri postvivigo de sia, ankaŭ de aliaj naciaj lingvoj. Esperanto viŝas la limojn inter popoloj kaj servas kiel ilia egalrajtiganto sendepende de ilia grandeco. Esperantistoj-ĵurnalistoj havas la avantaĝon antaŭ tiuj, kiuj, ekzemple komuniĝas nur per la angla. Etiko ĵurnalisma postulas de ĵurnalisto elserĉi la laŭeble veran bildon de kiu ajn okazintaĵo en kiu ajn lando. Kontaktoj kun eksterlandaj Esperanto-parolantoj helpas malkovri senantaŭjuĝan faktan bildon.

H. Tonkin atentigis, ke en la komenca periodo Esperanto funkciis ĉefe kiel skriba lingvo, nun ĝi ofte manifestiĝas kiel parola lingvo. Ĵurnalistoj havas unikan eblecon influi uzadon de la lingvo kaj la skriba kaj la parola. Ene de E-movado, do, la esperantistaj ĵurnalistoj ludas ŝlosilan rolon.



Vytautas Šilas

Vane ni ne AMAS popularajn AMASkomunikilojn

Homo povas hazarde informiĝi pri Esperanto, sed ne hazarde iĝas kaj restas esperantisto. Ŝajnas eĉ, ke naskiĝis mi esperantisto, nur ne sciis pri tio ĝis jam forgesita informa impulso.

Ni informas homojn, por ke ili memoru: nia lingvo disvolviĝas, utilas, plaĉas al eminentuloj ktp... Tio subtenas la renomon de Esperanto kaj tio certe gravas. Sed ne malpli gravas simpla konstanta menciado de la vorto Esperanto en paperaj kaj retaj informiloj, en radio- kaj TV-elsendoj. Mia persona preskaŭ 50-jara sperto donas al mi rajton aserti: ni multajn eblojn preteratentas.

Mi ĉiam ĵurnalistas en provincoj - distriktaĵoj kaj regionaj urboj. Miaj provoj aperigi ion priesperantan en ĉefurba gazetaro ĉiam fiaskis - tio multe pli oportunas por tieaj kolegoj (gravas personaj kontaktoj). Sed en loka gazetaro preskaŭ ĉiam aferoj sukcesis - ne nur pro kolegaj simpatioj. Jen jubileas ia eminentulo (ne nur ĉi tie naskiĝinta), jen tagĵurnalo fondis novan rubrikon, jen ĉefurba gazeto menciis pri Esperanto lige kun oportuna preteksto por reeĥi...

Mi verkas artikoleon pri la eminentulo, menciante lian esperantistecon (se li, feliĉe, vivas - mi sendas al li la aperigaĵon, ricevas ĝentilan respondon kaj la redakcio fanfarone rakontas pri la atento de l' grandulo!).

Mi salutas novan rubrikon kaj proponas por ĝi tradukitan el Esperanto artikoleon (historian, kulinarian, porsanan, filatelian ktp). Multfoje mi aperigis poemetojn, anekdotojn kun subskribo "Tradukita el Esperanto"...

En Rusio oni nun ne ofte legas "kvalitan" gazetaron pro multaj kaŭzoj - popularas TV, por junularo - radio... Sed multnombraj pritelevitaj gazetoj havas bonajn eldonkvantojn. Ĵus antaŭ mia forveturo al la Kongreso mi telefonis al la redaktoro de tia TVgazeto, laŭdis lin pro interesaj artikoloj en la informa suplemento kaj proponis kelkajn kuriozaĵojn el la freŝa kajero de "La Ondo de Esperanto". Li tuj donis al mi sian retadreson.

Modernaj radiostacioj senfine babilas kun aŭskultantoj pri io ajn. Ofte ili rakontas: hodiaŭ naskiĝis... aperis... mondfamiĝis... Ĉu ne estas preteksto telefoni kaj demandi: kial vi ne menciis, ke iu estis esperantisto?

Interalie: informagentejoj preskaŭ neniam rakontas pri UKoj. Kial ni ne skribas, ne telefonas, ne mesaĝas: "Jen mi tute hazarde eksciis, ke en iu mondfama urbo kunvenis du-tri miloj da homoj el 50-70 landoj kaj ili interparolas tute sen tradukistoj per ia Esperanto. Kio estas Esperanto? Kaj kial mia ŝatata gazeto rakontas pri filatelistoj, kaktusistoj, katamantoj, sed neniam - pri esperantistoj?". Provu ni ĉiujare ion similan!

Mi kunportis malgrandan parton de miaj aperigaĵoj kaj volonte rakontos al ĉiu interesoto pri detaloj.

Vjacheslav (Slava), Roĵdestvenskij (Rusio)

Iom pri DISVASTIGO

Gazetara agentejo Disvastigo liveras novaĵojn, artikolojn kaj dokumentojn pri problemoj de internacia komunikado kaj pri projekto Esperanto al gazetaro kaj al specialaj kategorioj (lingvistoj, politikistoj, junularaj organizoj k.t.p.)

La ĉefaj trajtoj de la aliro al gazetaro, kiel deklaras la kreinto de la iniciato Giorgio Bronzetti, ĉeestanta en Vilno, estas profesieco ("Disvastigo" estas registrita ĉe tribunalo kaj agas inter italaĵ gazetaraj agentejoj) kaj daŭraj kontaktoj kun ĵurnalistoj. Tre fruktodona estis ĝis nun la informa agado de Disvastigo, precipe en regiono de Abruzzo, kie la agentejo kreiĝis. Centoj kaj centoj da artikoloj ĝis nun aperis pri Esperanta vivo, kiel "Malkovru la mondon per Esperanto", "Vizito de japana esperantisto", "Ferii in Esperanto" aŭ gravaj longaj artikoloj, kiel:

- *Ne al lingvaj diskriminacioj favore al anglofonoj;*
- *Eŭropa Komunumo punas civitanojn ne anglalingvajn;*
- *Superregado anglusona kaj altrudo de la angla;*
- *Ĉu ni estas certaj, ke la angla helpas Eŭropan Union;*
- *Naskiĝo de "Sardenglish".*
- *Ĉe la Itala Lingva Akademio kun Orban granda festo de multlingvismo..kiu ne ekzistas*
- *Lingva diverseco kaj defendo de la naturmedio de Renato Corsetti*
- *La nova tutmonda lingvoordo de C.Piron kaj multaj aliaj*

Oni sukcesis dufoje publikigi ankaŭ en itala revuo artikolon kun aldono de kurso de Esperanto en KD en kvanto de 320.000 ekzempleroj.

La informoj dissenditaj de Disvastigo estas ankaŭ gazetaraj revuadoj pri lingva politiko, Eŭropa lingvo-problemo kaj lingvaj problemoj ĝenerale. La agentejo serĉas kunlaborantojn, kiuj sendu ĉiumonate resumojn de la artikoloj aperintaj pri tiu temaro en gazetaro de propra lando, precipe de novaj membroj de Eŭropa Unio, kies lingvoj ĝenerale ne estas tre konataj. Pere de serĉmotoroj gazetaraj (ekzemple la servo Alert de Google) la laboro estas ege facila. Eble oni povus aranĝi ankaŭ tradukojn de plenaj artikoloj por ĵurnalistoj, kiuj tion petus. Krome la kunlaborantoj, kiuj organiziĝus tiucele, povus liveri informojn ankaŭ al sialanda gazetaro kiel landa sekcio de la agentejo. Oni povas interŝanĝi opinioartikolojn

Giorgio Bronzetti direktoro
gbronzetti@disvastigo.it; www.disvastigo.it



Viajn impresojn atendas

Kiam viaj impresoj ankoraŭ ne forvaporiĝis, fiksi ilin sur papero aŭ klavoj. Estas interese, kiel al vi plaĉis ekskurso, prelegoj kaj la kongreso mem. Do kaptu liberajn minutojn, skribu kaj transdonu al la redaktoro de "La Fera Lupo". Viajn impresojn laŭeble aperigos "La Fera Lupo" kaj "Litova Stelo".

Jam rete legeblas "La Fera Lupo"

Ĉiutaga informilo de la kongreso jam legeblas en pdf-dosiero ĉe <http://www.esperanto.lt>.

Veraj okazintaĵoj (ne anekdotoj)

Itala studento:

- Ho jes, mi scias, kie estas Litovio. Ĉe vi duonjaron estas tago, alian duonjaron estas nokto.
- El tio sekvas, ke Litovio estas sur Norda Poluso, ĉar ĝuste tie la suno ses monatojn ne subiras kaj ses monatojn ĝi ne aperas.

Franca policano foliumas pasporton de litovo:


- Ha, vi ne havas Francian vizon!
- Mi ne bezonas vizon. Litovio jam kvar jarojn estas membro de Eŭropa Unio.
- Ĉu vere? Ĉu vi estas certa pri tio? – diras la policano.

Petras Čeliaskas

Kiel atingi la parlamentejon

en Gedimino avenuo 53

La hodiaŭa kaj morgaŭa kongresaj laboroj okazas en la litova parlamentejo. Eblas veturi per trolebusoj n-roj 10 kaj 11 de la *Žalasis tiltas* haltejo kaj vi eliru ĉe la *Lukiškės* haltejo. Aŭ vi povas piediri laŭ la nigra linio sur la suba mapo.



"Litova Stelo" por Vi



Jam deknaŭan jaron sur la Esperanta firmamento denove lumas la revuo renaskiĝinta "Litova Stelo". Aperas 6 numeroj jare kaj ĉiu po 32 paĝoj plus koloraj kovriloj. Ĉiuj tekstoj estas en simpla Esperanto kaj ne nur pri Litovio. Ĉi tie vi trovos diverstemajn artikolojn, originalan kaj tradukitan beletron, distrajn paĝojn ks.

Ĝenerala abonprezo estas 14 eŭroj jare. Orient-eŭropaj kaj ekssovetiaj landoj havas konsiderindan rabaton. Dum la kongreso turniĝu ĉe la libroservo.

Litovino sukcesa – kongreso sukcesa



El la redakcio

La redakcio kolektas viajn kontribuojn per retadresoj: ds@esperanto.lt; chtaesok@hanmail.net aŭ pere de organizantoj aŭ persone. Jen estas bona ŝanco kontribui al la lasta numero.